# 98ª UK. GEM*** -kongresano ĉe la Vikingoj




De la 20ª ĝis la 27ª de julio 2013, la 98ª UK okazis en Islando, tiu « freŝdata » insulo, kie apudestas akvo, fajro kaj glacio ; la ekskurso post la Kongreso montris ĉiujn aspektojn de la suprenirado de la internaĵo de la Tero meze de oceano. Ĝi laŭiris laŭ la limo de la du tektonplatoj, kiuj malproksimiĝas unu for de la alia je ĉirkaŭ 3 cm-oj jare tiel ke al la surfaco supreniras lafoj, kie, kun la latitudo estas akvo kaj glacio. Kaj ĉiuj miksiĝas.



Vikingo

Kaj ĉio, kio estas videbla de tiu insulo estas nova : la plej malnovaj ŝtonoj datiĝas de la Mioceno, t.e. de malpli ol 15 milionoj da jaroj - kiam homo ne jam ekzistis sed nur diferenciĝis de la simioj kaj ĉimpanzoj – dum la nevideblaj tektonplakoj aĝas je pluraj miliardoj da jaroj kaj ilia ĉiama kreskanta intervalo naskas tiun insulon.


Gejseroj apud Geysir

Kaj tiu intervalo estas tuj plenigita de magmo kiu ŝprucas, ĉu kiel vulkanoj, kiuj sendas ŝtonetojn aŭ cindrojn, kiuj amasiĝas, ĉu kiel likvaj disfluantaj lafoj kiuj, kiam ili solidiĝas, estigas bazaltajn kolonarojn, ĉu kiel akvo kaj gasoj, kiuj eliras el fendetoj en gasjetoj, gejseroj, varmakvaj fontoj, ... de disfendoj en kiuj enjetiĝas riveroj kun akvofaloj, ĉar ĉe la surfaco ekzistas ekde malpli ol 120 000 jaroj – Würm glaciepoko – dika tavolo de glacio, kies dikeco povas atingi 1 000 metrojn ! Kaj kelkfoje tio, kio eliras renkontas tiun glacion !


Sed pli freŝdata interagado okazis kiam Vikingoj, kiuj sekvis korvojn atingis Islandon ĉar skandinavaj dioj miksiĝis al la naturo !

Ekzemple :

- la okpieda ĉevalo de la dio Odino lasis spuron de sia hufo en Dettifoss : imponaj akvofaloj !
- dek tri islandaj Juloj – filoj de famaj troloj : Gryla kaj Lappudi – krom somere, loĝas kaj estas videblaj apud la Lago Myvatn, en Dimmuborgir.
- en la jaro 1000, iu « Diranto de la Leĝo » en la plej malnova Parlamento de Eŭropo en AlÞing decidis ke islandanoj fariĝu kristanoj kaj forjetis ĉion, el la paganaj idoloj, kie, de tiam, estas la akvofalo Godafoss.


Thingvellir : promenado inter Ameriko (maldekstre) kaj Eurazio (dekstre)... Tie, akvo fluas inter la du tektoplakoj.

Kaj ankaŭ, ekde ĝia apero, Islando gastigis multajn vivantajn estaĵojn : la plej multnombra faŭno konsistas en birdoj kaj fiŝoj. Pri la flaŭro, homo starigis problemon, kiam li kunportis ŝafojn, kiuj manĝis ĉiujn vegetaĵojn kaj preskaŭ ĉion dezertigis ... kaj plie, homo uzis lignon por hejti domojn...


Likenoj sur lafoj

Nun modernaj rimedoj aperis : la varmeco de lafoj kaj de akvofontoj estas uzataj kaj produktas hejtadon kaj energion ! Ekzemple, piede de la vulkano Hengill, inter Þingvellir kaj Rejkjaviko : varmaj fontoj per varmizolitaj tuboj sendas varman akvon, kiu hejtas la tutan ĉefurbon kaj ankoraŭ pli varmaj fontoj produktas ĝian elektron – kaj tio okazas en multaj aliaj lokoj de la kamparo.

GEM*** = Groupe Espéranto du Maine

**GLACIEJOJ :**

I Langjökull

II Hofsjökull

III Vatnajökull

IV Myrdajökull

1 Akureyri
2 Lago Myvatn + Dimmuborgir
3 Godafoss
4 Siglufjördur
5 Dettifoss
6 Hveravellir
7 Gullfoss + Geysir
8 Þingvellir
9 Rejkjaviko

*Bezonataj klarigoj por la skemo de la p. 19*


Myvat. Bano

*Daŭrigo kaj fino : paĝon 20*